**6. Limigoj**

(1) Ne povas esti por iu lando pli ol unu ĉefdelegito.

(2) Ne povas esti por iu regiono pli ol unu regiona delegito.

(3) Ne povas esti por iu urbo aŭ vilaĝo pli ol unu loka delegito, unu vicdelegito kaj unu junulara delegito.

(4) Unu persono ne povas esti faka delegito por pli ol tri fakoj.

**7. Demisio kaj malkonfido**

(1) Delegito, kiu ĉesas dum sia oficperiodo esti individua membro en la kategorioj MJ, MA aŭ DM aŭ Honora Membro (aŭ, en kazo de junulara delegito, ĉesas esti ankaŭ individua membro de TEJO), estas konsiderata kiel demisiinta.

(2) La Estraro aŭ la koncerna landa asocio povas esprimi pri ĉefdelegito malkonfidon sen doni klarigon.

(3) Ĉefdelegito povas esprimi pri regiona delegito, loka delegito aŭ vicdelegito malkonfidon sen doni klarigon. La malkonfidito rajtas apelacii al la Estraro. Se la apelacio sukcesas, oni konsideras la malkonfidon retirita.

(4) Ĉefdelegito povas esprimi pri junulara delegito malkonfidon sen doni klarigon. La malkonfidito rajtas apelacii al la Estraro de TEJO. Se la apelacio sukcesas, oni konsideras la malkonfidon retirita.

(5) La Direktoro de la Centra Oficejo povas esprimi pri faka delegito malkonfidon sen doni klarigon. La malkonfidito rajtas apelacii al la Estraro. Se la apelacio sukcesas, oni konsideras la malkonfidon retirita.

**8. Vaka ĉefdelegiteco**

Se vakas por iu lando la ĉefdelegiteco, ĝin plenumas la Direktoro de la Centra Oficejo.

**9. Senpaga servo, kompenso**

Delegito disponigas siajn servojn senpage; tamen rajtas al taŭga kompenso pro elspezoj super iu minimuma nivelo difinita de la delegito mem laŭ siaj propraj cirkonstancoj.

**10. Valideco de petoj**

(1) Peto farita en nacia lingvo aŭ de nemembro de UEA estas malvalida.

(2) Delegito povas rifuzi validan peton sen doni klarigon sed devas tuj informi pri tio la petinton. Malvalidan peton la delegito povas rifuzi sen informi.

**11. Plendoj**

(1) Kliento de la Delegita Reto rajtas plendi pri nerespondo; ankaŭ pri malbone plenumita servo, se la kliento povas montri, ke la koncerna delegito agis senzorge aŭ kun malbona fido. Pro nerespondo aŭ malbone plenumita servo la kliento tamen ne rajtas al ia kompenso.

(2) Plendojn oni adresu al la koncerna ĉefdelegito, la Direktoro de la Centra Oficejo aŭ la Ĝenerala Sekretario. Se la Direktoro de la Centra Oficejo aŭ la Ĝenerala Sekretario ricevas plendon, tiu tuj informas la koncernan ĉefdelegiton.

**12. Ĉiujara raporto**

Ĉefdelegito ĉiujare enketas pri la agado de la delegitoj en sia lando kaj skribe raportas al la Direktoro de la Centra Oficejo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**UEA-kodo** ___ ___ ___ ___ – ___

**Lando** _____

# RESPONDILO por DELEGITA RETO

***Bv. atenti: Kandidato por delegitiĝo devas esti individua membro de UEA minimume en kategorio MJ(-T) ekde la jaro antaŭ la delegitiĝo.***

La subskribinto kandidatiĝas kiel *(metu X)*:

☐ **loka delegito** ☐ **junulara delegito**

☐ **vicdelegito** ☐ **faka delegito**

**ĈIO PER LATINAJ PRESLITEROJ, NACILINGVE**

Loko _____ Nombro de loĝantoj _____

Landparto aŭ provinco _____

Familia (ĉefa) nomo _____

Propra nomo _____

Adreso: Strato _____

_____

Poŝta kodo _____

Urbo _____

Naskiĝdato _____ Profesio *(en Esperanto)* _____

Telefono *(hejma)* _____ *(ofica)* _____

Telefakso *(hejma)* _____ *(ofica)* _____

Retadreso *(nur unu)* _____

KANDIDATO POR FAKA DELEGITECO PLENIGAS:

1-a fako: _____ Kvalifikoj: _____

_____

2-a fako: _____ Kvalifikoj: _____

_____

3-a fako: _____ Kvalifikoj: _____

_____

La subskribinto promesas zorge plenumi la oficon kaj certigas, ke estas plenumitaj ĉiuj kondiĉoj de la Regularo pri Delegitoj.

**Dato** _____ **Subskribo** _____

**Bonvolu sendi la plenigitan respondilon al via ĉefdelegito, aŭ, se tiu ne ekzistas en via lando, al la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

ĈEFDELEGITO / DIREKTORO DE LA CENTRA OFICEJO PLENIGAS:

loka delegiteco akceptita: jes / ne
vicdelegiteco akceptita: jes / ne
junulara delegiteco akceptita: jes / ne
faka delegiteco: 1-a fako rekomendata: jes / ne
2-a fako rekomendata: jes / ne
3-a fako rekomendata: jes / ne

Dato _____ Subskribo _____

DIREKTORO DE LA CENTRA OFICEJO PLENIGAS:

faka delegiteco: 1-a fako akceptita: jes / ne
2-a fako akceptita: jes / ne
3-a fako akceptita: jes / ne

Dato _____ Subskribo _____

CENTRA OFICEJO PLENIGAS:

Individua membro ☐ Konsilaro sendita ☐ Enskribita _____

Ne plu ekde _____ pro _____

_____

# REGULARO PRI DELEGITOJ

**1. Amplekso**

Ĉi tiu regularo donas preskribojn pri la elekto kaj funkciado de la delegitoj en la senco de paragrafo 21 de la Statuto.

**2. Konstanta disvolvo**

UEA celas konstantan disvolvon de la Delegita Reto, ĉiam super kvanto emfazante kvaliton.

**3. Kategorioj**

(1) Oni rekonas la jenajn kategoriojn de delegito:
(i) ĉefdelegito, kiu reprezentas la Asocion en iu lando;
(ii) loka delegito (mallonge: delegito), kiu reprezentas la Asocion en iu urbo aŭ vilaĝo;
(iii) vicdelegito, kiu helpas al la loka delegito;
(iv) junulara delegito, kiu reprezentas TEJO en urbo aŭ vilaĝo;
(v) faka delegito, kiu reprezentas la Asocion en iu fako.

(2) Por landoj, kie tio utilas, la Estraro povas en konsiliĝo kun la koncerna ĉefdelegito rekoni ankaŭ regionajn delegitojn.

(3) Pri la difino de lando decidas la Estraro en konsiliĝo kun la Komitato. Pri la difino de regiono decidas la koncerna ĉefdelegito kun aprobo de la Estraro. Pri la difino de urbo aŭ vilaĝo decidas la koncerna ĉefdelegito kun aprobo de la Direktoro de la Centra Oficejo. Pri la difino de fako decidas la Direktoro de la Centra Oficejo kun aprobo de la Estraro.

**4. Oficperiodo**

(1) La elektojaro por la delegitoj estas 1995 kaj ĉiu jaro, kiu sekvas per tri jaroj la antaŭan elektojaron.

(2) La delegitojn oni elektas ĝis la fino de decembro en elektojaro kaj ili oficas ĝis la fino de decembro en la sekva elektojaro.

(3) Oni povas elekti delegiton ankaŭ alitempe por ofici ĝis la fino de la kuranta oficperiodo.

**5. Elekto**

(1) Kandidato por delegiteco devas esti individua membro en la kategorio MJ, MA aŭ DM aŭ Honora Membro en la jaro de elekto kaj en la antaŭa jaro. Junulara delegito devas esti ankaŭ individua membro de TEJO. Kandidato por faka delegiteco devas montri profesian aŭ akademian ligon kun la koncerna fako aŭ alimaniere indiki en skriba prezento sian kompetenton.

(2) Ĉefdelegiton elektas la Estraro kun aprobo de la koncerna landa asocio.

(3) Regionan delegiton, lokan delegiton, vicdelegiton aŭ junularan delegiton elektas la koncerna ĉefdelegito.

(4) Ĉefdelegito povas rifuzi elekti regionan delegiton, lokan delegiton aŭ vicdelegiton sen doni klarigon. La rifuzito rajtas apelacii al la Estraro. Se la apelacio sukcesas, oni konsideras la delegiton elektita.

(5) Ĉefdelegito povas rifuzi junularan delegiton sen doni klarigon. La rifuzito rajtas apelacii al la Estraro de TEJO. Se la apelacio sukcesas, oni konsideras la delegiton elektita.

(6) Fakan delegiton elektas la Direktoro de la Centra Oficejo en konsiliĝo kun la ĉefdelegito de la lando, kie tiu rezidas.

(7) La Direktoro de la Centra Oficejo en konsiliĝo kun la koncerna ĉefdelegito povas rifuzi elekti fakan delegiton sen doni klarigon. La rifuzito rajtas apelacii al la Estraro. Se la apelacio sukcesas, oni konsideras la delegiton elektita.